



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban, **PERPIGNAN (P.-O.)** - Telefono 34-38-84

-o-o-o-o- Numero 7 -o-o-o-o- (Trinonata Bulteno.) -o-o-o-o- Julio 1962 -o-o-o-o-o-

NI NE FUSU LA LINGVON, ... NI NE FUSU LA MOVADON .

oo

Oni povas plurmaniere fuŝi nian lingvon. Unue, kiam oni uzas ĝin ne praktikante strikte la regulojn de la Fundamento, aŭ tiujn krome jam aprobitaj de la Esperanto-Akademio.

La saman rimarkon ni ripetos, koncerne la uzon de la vortaro. Ni konsilos volonte al la gekomencantoj kaj eĉ al la sufiĉe spertaj gesamideanoj, uzi preferinde klasikajn formojn - kompreneble, ĉiufoje kiam ili povos tion - kaj preterlasi, kiel eble plej ofte, dubindajn formojn aŭ neologismojn, kiam la tradiciaj formoj estas sufiĉe klaraj.

Ekzemple : Uzu kutime la vorton "malriĉa" preferinde al "povra", kaj lasu volonte tiun novan formon al la poetoj aŭ al la teknikistoj.

Laŭ ni, vorto devas esti nepre forlasata, kiam ĝi estas dusenca.

Ni legis tamen, en bonega vortaro : "Fiasko (el la itala lingvo) boteleto, flakono.

Sekve, kion povas pensi la komencanto al kiu ni diros ekzemple tiun tradician frazon: "Volapŭko baldaŭ fiaskis ..." Li tute prave povus demandi : "Ĉu oni metis Volapŭkon ... en boteleton ? ..." - Do, la vorto "fiasko" signifante "flakono" devas esti forlasata.

Kial do, tute simple, ne uzi rekte la vortojn "flakono" aŭ "boteleto" kiam taŭgas.

Ni konstatis tre oftan misuzon de la vorto "fremda". Laŭ tre bonaj metodoj de Esperanto, "fremda" signifas precipe = "kontraŭnatura" (ekz: fremda objekto en la okulo.)

Kial do ni aŭdas tiel ofte : "Mi renkontis "fremdan" Samideanon. Kion do povos pensi Esperantisto el alia lando, kiam, en klubo, la Prezidanto prezentas lin al la membroj, dirante : "Mi prezentas al vi fremdan Samideanon". Kaj tiu, tute prave povus respondi : "Bone, ĉar mi estas "fremdulo" (t-e.entrudiĝinto), restas al mi nur unu solvo : "Foriri tuj de ĉi tie." Ni do tre zorge evitu tiajn groteskajn kaj eĉ danĝerajn esprimojn.

Por daŭrigi la ekzemplon, kial do ni ne dirus, tute simple, klare kaj kompreneble : "Mi renkontis alilandan Samideanon" (aŭ) "Mi prezentas al vi eksterlandan Samideanon."

Kaj, tiamaniere, la vizitanto neniel povos kompreni ke li estas (eble) "entrudiĝinto" (kontraŭnatura "ulo".)

Tiaj rimarkoj ĝenerale ne plaĉas al ni. Ni uzas ilin, nur kiam ni opinias ke ili estas nepre necesaj. Efektive, kiam oni troigas ilin, oni riskas senkuraĝigi la gelernantojn, kiuj, tre volonte emus opinii ke nia lingvo, malgraŭ niaj pretendoj, estas tre malfacila kaj ne havas sufiĉe gravajn fundamentojn. Do, por konkludi, ni parolu, kiel eble plej simple, klare kaj korekte.

Sed, kiel antaŭdiris la dua parto de nia titolo, senkonsideraj kritikoj pri Esperanto aŭ pri verkistoj en tiu lingvo, grave fuŝus, iom post iom, la lingvon mem, kaj, konsekvence, nian propran "Movadon".

Ni estas kontraŭ la uzon de neologismoj. Sed, ni rediras tamen volonte : "Uzu ilin, sed nur kiam ili estas nepre necesaj. Krom tio, lasu ilin preferinde al la teknikistoj, la poetoj, la fakuloj (k.t.p...) Pli volonte uzu vortojn kaj regulojn de la "Fundamento".

Kelkaj Samideanoj, kvankam spertaj, maldistingas kelkfoje "recenzon" kaj "kritikon".

Ili deziras doni sian propran vidpunkton pri nova libro. Tre bone. Sed, antaŭ ĉio, ili estas, same kiel fiŝirurgiistoj, sekciilo en mano, atendante senpacience trovi kelkajn erarojn (kiuj estas plejofte nur preseraroj). Poste, ili zorge notas, kolektas, kaj komentas ilin, pli malpli akre, kvazaŭ se ili volus atribui al si meriton ... pli grandan ol tiu de la verkisto mem. Tio ne estas fakte "recenzoj", sed "kritikoj".

Tiu jukmalsano de kritikoj estas vere terura kaj danĝera.

Se ni daŭrigos tiajn agmanierojn, ni ĝisfunde detruos Esperanton, kaj ni mem fosos nian propran tombon.

Ni devas ne detrui, sed konstrui.

Se ni havas, (eble) iun ajn talenton pri tio, ni praktiku Esperanton, eĉ, se ni estas kapablaj, ni verku novelojn, romanojn, poemojn, fablojn ... sed, ne perdu multekostan tempon, en tute ne-utilaj, eĉ tro malofte malutilaj kritikoj.

